

St. Louis - Mo

AMERIKA ESPERANTISTO

DECEMBER, 1918

RAPORTO ESPERANTISMA

G. W. LEE



OFFICIAL ORGAN OF
THE ESPERANTO ASSOCIATION
OF NORTH AMERICA

AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN of

The Esperanto Association of North America, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the
International Auxiliary Language, Esperanto.

CO-EDITORS: NORMAN W. FROST

MRS. I. M. HORN

CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

BERKELEY, CALIF.

Berkeleya Esperanta Rondo.—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Wednesday evenings. Address Vinton Smith, 530 62nd St., Oakland, Calif.

OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Sec. & Treas., 438 15th St. 19

SAN FRANCISCO, CALIF.

San Francisco Rondo, meets Third Friday eve., Rm. 315 Lick Bldg., 35 Montgomery St. F-ino M. D. Van Sloun, Sec'y, 946 Central Av.

BRIDGEPORT, CONN.

Bridgeport Esperanto Society meets every Friday at 7.30 P.M. At 284 Dover St., near Remington Arms. S-ro Gustavus McGroirty Sek., 525 Fairfield Av. Marcus L. DeVine, Pres., 284 Dover St. Visiting Esperantists call Barnum 1294-Ring 13. 19

WASHINGTON, D. C.

La Kabea Esperanta Klubo, 1389 Quincy St., kunvenas ĵaŭdon vespere. 19

CHICAGO ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. Jaroslav Sobehrad, Sec'y, 1115 W. 19th Place. La Esp. Oficejo, 1669 Blue Island Ave. Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate. 19

BOSTON, MASS.

Boston Esp. Soc., 402 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 7 P.M. Miss A. Patten, Sec.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society. Business Institute, every Friday, 8.00 P.M.

PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society, Trelawny Bldg. Miss M. G. Ingalls, Sec'y, The Windsor, State St.

DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M.-9 P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P.M.

La Pola Esperanto Asocio, B. Lendo, Sek., 120 29th St.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

PLAINVIEW, NEBR.

Esperanto-Fako de la "Sola Skolto" (Lone Scout), 500 N. Dearborn, Chicago, Ill. (Revuo por la Junularo. Organizu grupon inter la geknaboj. Granda sukceso. Abonu tuĵ! Ĵare 75; Kvarmonate .25.) Fakestro, Chas. P. Lang, Plainview, Nebr.

MANCHESTER, N. H.

Pionira Grupo. Sek., Daisy E. Flanders, 714 Beech St. 19

HOBOKEN, N. J.

"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8.30 P.M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haugland; Sec'y Wm. Prusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

NEW YORK CITY, N. Y.

The Greater New York Esperanto Society, including all chartered clubs in Manhattan, The Bronx, Brooklyn, Queens, Richmond, Long Island, Westchester County and the New Jersey suburbs, Miss Leonora Stoeppler, Sec., 105 W. 94th St.

The New York Barĉo, or Esperanto supper, is held on the THIRD FRIDAY of every month (7 P. M.), at the new headquarters of the Civic Club, 14 West 12th St. (two doors west of 5th Ave., south side); conveniently located to "L" and subway lines.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Av.

PHILADELPHIA, PA.

Phila Esp. Soc. J. F. Knowlan, Sec., 45 No. 13th St. Meets 4th Fri., Windsor Cafe, 1217 Filbert St.

Rondeto de Litovo-Polaj Esperantistoj, 2633 Livingston St.

PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art. James McKirdy, Sec., Box 920. Fridays, 8 P. M.

MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantists. S-ino B. H. Kerner, Sek., 632 Summit Av., 3d Tuesdays, 8 P.M. 19

Amerika Esperantisto

American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

A true translation of the non-English portion of this magazine filed with the Postmaster, Boston, Mass.

Published Monthly by

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)
WEST NEWTON, MASS.

One Dollar a Year.

Single Copy Ten Cents.

VOL. 23

DECEMBER, 1918

NO. 4

RAPORTO ESPERANTISMA

De G. W. Lee

N. B. — La nombroj inter krampoj () signifas: Vidu tiun nombran sektion, poste aŭ antaŭe. Plejparte la aludoj estas al 5 (Gramatiko).

Kia statistiko plej utilas al ni? Ne facila estas la precizigo. Konstati ian, estus (por mi) nur diveni. Longe mi deziris multan por mia uzo; pro kio, en 1917-18, mi elsendis enketajn poŝtkartojn kaj cirkulerojn. Al tiuj revenis ŝatindaj respondoj, kiuj, kune kun la informo de kelkaj gazetoj, jarlibroj kaj diversaj monografioj, donis al mi la kuraĝon verki memvolan raporton.

Eble la legantoj de tiu ĉi raporto eksentos iun mankon de (5) ciferaĵoj. Verŝajne, ĉar la respondaro, kiel ankaŭ la presitaro, emis esti rakonta, nemulte cifera. Tamen, per ambaŭ (kvankam kredante jam de longe) mi elkonvinkigas (5) ke nia lingvo internacia ja vivas kaj kreskas.

Por almontri la rezulton de mia serĉado, mi elektas (5) la jenajn nombritajn (5) titolojn de la pritraktitajoj:*

0 Esperantujo 1 Studo 2 Uzo 3 Propagando 4 Konduko
5 Gramatiko 6 Personoj 7 Bibliografio 8 Miksaĵo 9 Bezono

* Sugestias la Dewey Decimala Sistemo, kiun, post nelonge, mi esperas ke ni ĉiuj kutime uzos.

Sen plua prokrasto, mi komencas pri Esperantujo; kiun temon mi multe pli longe pritraktos ol la aliajn, precipe ĉar mi ne havas sufiĉe da tempo aŭ gazetospaco por ili.

0 — Esperantujo

Kie troviĝas tiu mistera loko? Tra la tuta mondo, ĉu ne? Certe; kaj ero el ĝi estas ĉiu loketo kie vivas la lingvo. Eltrovi la tutan loketaron estus longedaŭra tasko, kaj tie ĉi mi kontentiĝos atestante la amplekson per kelkaj citoj, resumoj kaj sugestioj.

Sajnas al mi, ke (5) sendube Britujo estas la plej aga Esperantolando, kaj Londono la plej aga Esperanto-urbo. Pro tio, kaj pro la fakto ke dum pli ol monato, la someron de 1914, mi samideane vizitis Britujon (tiel estante iom "kon-scia" pri ĝi), mi aludas libere al Brituja (5) ekzempleco. Sed, ni ne forgesu, ke logike, multkunsente, kaj fakte, la organizo kaj la oficejo kaj la verkado de la Universala Esperanto-Asocio (10, rue de la Bourse, Genevo), estas atentindaj kiel formantaj (5) la centron de Esperantujo; kaj ke, kiom ajn mi volus publikigi Britajn agadojn kiel laŭsekvindaj, estas racie alpreni la raportojn de U. E. A. por la fundamento de la mia.

Taŭga estas la libreto titolita "Esperanto dum la Milito"; kiu anstataŭis la "Jarlibro" (5) por 1917. Paĝoj 18-26 entenas mallongajojn pri la "Stato de Esperanto en la Diversaj Landoj." Tiu kroniko estas grava, kaj oni volus (5) ke ĝi estus multe pli longa kaj detala. Tiam statistikon ni bezonas por trafa informo pri la movado tramonda. Ĝi montras ke, dum la milito, kontraŭ al kio (5) multaj skeptuloj volas kredi, nia kaŭzo nek mortis nek ĉie eĉ dormis, sed, efektive, progresis. Mankas la spaco por citi la vortojn de tiuj ĉi paĝoj; tamen, mi povas prezenti almenaŭ komparan tabelan resumon, por helpi la leganton al ĝenerala kompreno de la movado.

Entute, la tabelo (supoze) liveras la sekvan resumon de la 1917a stato:

La movado viglas en Britujo, Rusujo, Svedujo, Argentino kaj Brazilujo (plejmulte en Britujo); kontentigas en Aŭstrio-Hungario, Germanujo, Nederlando, Portugalujo kaj Svisujo; loke viglas en Balkanlandoj, Belgujo, Danujo, Francujo, Hispanujo, Norvegujo, Polujo, Usono, Urugvajo, Japanujo, Finujo kaj Persujo (eble viglegas kelkloke); dum pri Finnlando, Italujo, Kubo, Aŭstralio, Nova Zelando kaj Sud-Afriko, la informo estas ne sufiĉa rajtigi definitivajn aserton. Fine, pri Kanado, Meksikujo kaj Hindujo, estas ne novaĵo. Ne komprenu ke en tiuj landoj de "ne novaĵo" estas ne movado, sed komprenu ke tiu raporto ne enhavas iliajn nomojn en (5) la listo. Plue, por daŭrigi la ĝeneralajon plej eble ĝisdaten, mi travidis la gazeton "Esperanto" de januaro ĝis aŭgusto (inkl.) 1918, kaj trovas ke tiun jaron Aŭstrio-Hungario kaj Svedujo meritas (laŭraporte) esti sub "a," Germanujo sub "A," kaj Rusujo sub "*" Alia statistiko, la nombro da gazetoj, en la maldekstra vico de listo II, montras ke en 1917 estis almenaŭ dudekdu.

Tia tabela informo havas severajn limigojn, kaj devus esti interpretata kun larĝeco de komprenado. Sed oni devus legi la tutan pamfleton el kiu mi alformis ĝin. Krome, la kroniko, en ĉiu kajero (5) de "Esperanto," havas tian informon el kia la 1917a statistiko estis kompilata. Tial, mi kredas ke estos konvene, se mi iom citos

II

Gazetoj aŭ bultenoj dumilite aperantaj

Atentinde vigla

Vigla

Kontentiga

Loke vigla

? : ne, aŭ nesufiĉa, novaĵo

* Vidu noton

KOMPARA STATISTIKO

Laŭ U. E. A. 1917 libreto

III

I

- K Aŭstrio-Hungario
- L Balkanlandoj
- L Belgujo
- 2A * Britujo
- 1 ? Finnlando
- 2 L* Francujo
- 3 K* Germanujo
- 2 L Hispanujo
- 1 ? Italujo
- 2 K Nederlando
- 1 L Norvegujo
- L Polujo
- L Portugalujo
- 1 V* Rusujo
- 1 V Svedujo
- 1 K Svisujo
- * Ameriko (Nord-)
- * Kanado
- 1 ? Kubo
- 1 L* Usono
- * Ameriko (Sud-)
- 3a Argentino
- V Brazilujo
- L Urugvajo
- * Aliaj kontinentoj
- 1 L Japanujo
- L Finujo
- ? Nova Zelando
- L? Persujo
- ? Sud-Afriko
- ? Hindujo
- Alilokoj

Se, unuavide, la tabelo aspektas komplika, mi certigas ke tia ĝi estas malpli ol oni supozas. Por klarigi: Listo I, de landlimoj, estas memevidenta; Listo II (oblikva) de (5) vortoj kaj frazoj, kun pli nigraj literoj kaj signoj, estas priskriba rilate la staton de Esperanto en prialdutaj landoj; kaj Listo III, de enjetitaj literoj kaj signoj, alude interrilatas la priskriban liston, II, supre (5), kun la noma, I, transe. Ekzemple: Kia estas la stato de Esperanto en Persujo? Trovu "Persujo," en listo I, sub "Aliaj Kontinentoj"; tiam vidu, maldekstre, en la sama linio, la signon "?" kaj la literon "L"; tiam, vidu supren, perpendikulare, kaj trovu ke en listo II la litero "L" komencas la linion de la frazo "Loke vigla" kaj la signo "?" komencas la linion de la frazo "ne, aŭ nesufiĉa, novaĵo." Tiuj du frazoj signifas la raporton pri Persujo. Sammaniere, oni ekscias ke la movado en Britujo estis "Atentinde vigla" (A), ankaŭ koncerne kio (5) "Vidu subnoton" (*), kaj ke en tiu lando eldoniĝis du "Gazetoj" Plue, rimarku la nuancon de priskribo rilate Argentinon, kies atentindeco estas el la kvalito "a", apenaŭ "A". (Mi volus aldoni ke la novaĵo de 1918, por la gazeto "Esperanto" iom ŝanĝas la priskribon, por tiu ĉi jaro, koncerne kelkajn landojn.) Kio estas la speciala kialo por la tabelo formo? Tio, ke ĝi ebligas la duoblan respondon: unue, al la demando, kio estas la stato en tiu lando? due, en kiuj landoj estas tio la stato? (kompreneble, simile al la kialo por ĉiuj tabeloj).

* (Subnotoj.) Rilate la sep landojnnotitajn per *, mi volus aludi speciale jen: La movado en Britujo meritas apartan pritrakton, kiun vidu sub sekcio 0; Francujo havas sendube pli da agado ol oni ekscias, pro la cenzurado; Germanujo aperas multe pli agada, se oni legas la Kronikon en "Esperanto," Jan.—gisdato, 1918; Kanado, kompreneble, ne havas multe da Esperantejoj, sed ĉe la "Greenacre" kunveno (jul. 18-21), du aŭ pli lokoj estis reprezentataj; Meksikujo certe havas Esperantistojn, kaj konjekte, unu aŭ pli grupojn; same pri Hindujo; sed rimarku, ke la ciferoj estis laŭ la novaĵo en la pamfleto. La manko de (5) novaĵo sugestias la bezonon (5) por la kunago de la mondesperantistaro, celen ke la U. E. A. jarlibro estu vera "mino" da utila informo por ni ĉiuj kiu ajn nia grado en la internacia lingva movado. Rilate Aŭstralion kaj Rusujon, mi volus noti same kiel pri Germanujo.

kaj resumos la 1918ajn kronikojn de tiu gazeto, por ke ni havu la novaĵon de la "oficiala" organo laŭeble lastatempa (5).

Aŭstrio-Hungario.

(Majo). **Fiume**: "La itallingva duomonata gazeto 'Il Risveglio' decidis malfermi konstantan Esperantan rubrikon gvidotan de S-ro G. Knering." **Petschaŭ b. Karlsbad**: "S-ro J. Storch, verkisto, paroladis antaŭ 120 personoj ĉe la muzik-lernejo. Ĉirkaŭ 60 personoj nun partoprenas kurson gvidatan de S-ro Storch." (Junio). **Budapest**: "La Filatela kaj Esperanta ekspozicio, kiun ni anoncis en la lasta numero, okazis de la 13 ĝis la 18 aprilo (5). La ekspozicio vekis grandan intereson en ĉiuj klasoj de la societo." **Neŭstift**: "S-ro A. Kudela komencis kurson en la monahinejo de Franciskinoj, la estrino kun ĉiuj naŭ instruistinoj entuziasme lernis nian lingvon."

Balkanlandoj (Bulgarujo).

(Junio). **Sofio**: "Estas fondita de S-ro Gaŝevski centra librejo Esperanta, 46 str. Mario Luizo. Ĝi jam nun faras grandan bruon pri Esperanto kaj bonan komercon de Esperantaĵoj."

Belgujo.

(Januaro) **Gent**: "Malgraŭ la malfavoraj cirkonstancoj, nia movado ne pereis. Dum 1916 fondiĝis du grupoj, 'Progreso' kaj 'Kunfrateco' (5). Kursoj estas aranĝitaj, kaj novaj adeptoj varbiĝis. En la antaŭurboj Lede kaj Gentbrugge, la grupoj ankaŭ vivas kaj propagandas per festetoj kaj kursoj. En alia antaŭurbo, Mont St. Amand, la Grupo 'Progreso' starigis kurson, kiu verŝajne naskigos (5) novan grupon."

Britujo.

Multe da kroniko. Vidu specialan traktadon post la aliaj landoj.

Danujo.

Aprilo. "La kluboj en **Kopenhago** kiel kutime havas kunvenon ĉiusemajne. La konversacia klubo (v. Britujo, j) kunvenas tri aŭ kvar fojojn monate; kaj 'Societo de Danaj Esp-istoj' unu fojon dum la vintro havas publikan kunvenon. La 28 febr. la membroj kun siaj konatuloj ĉeestis interesan vesperon; paroladon faris F-ino Noll pri: Vivanta artefarita lingvo. Oni ankaŭ prezentis literaturan ekspozicion. Trimonata kurso por komencantoj baldaŭ finiĝos. La instruisto, S-ro Martin Blicher, kiu jam instruis diversajn kursojn, povas anonci pli ol ordinara intereso ĉe la lernantoj." **Centra Dana Esp. Ligo** "elsendis al la grupoj, kiuj aliĝas al la Ligo, la ĉiujaran demandaron pri 'laboro farita en (5) la pasinta jaro,' kaj el la respondoj de la provincoj oni kun ĝojo ricevis informon pri tre bona laboro de la laborista grupo 'Unueco' en **Odense**."

Francujo.

(Jul-Aŭg.) **Angers**: "Propagando estas komencita inter usonaj soldatoj." **Beziers**: "Lernintaj ĉe la Pariza Laborborso tie propagandas, helpataj de S-ro Pignol, veninta el (5) Narbonne." **Bourg-la-Reine**: "S-ro P. Muffang komencis propagandon en la urba lernejo J. B. Say." **Lyon**: La laborista grupo aranĝis du novajn kursojn." **Paris** (5): "S-ino E. F. Cense aranĝis koresponde du kursojn, kiujn partoprenas 22 mobilizitoj el la tranĉeoj. La grupon vizitis Esp. mobilizitoj el Aŭstralio, Britujo, Belgujo, Kanado kaj Nov-Zelando."

Germanujo.

(Aprilo) **Berlin**: "S-ro Nienkamp, la konata verkisto de 'Fuersten

ohne Krone,' faris tre sukcesan paroladon en la virina klubo. En la kuracista unuigo de Berlin-Halensee, S-ro D-ro Wunsch faris paroladon pri 'kuracisto kaj Esp.,' kiu estas aperonta en la ĵurnalo 'Archiv fuer physikalisch diaetetische Therapie in der Praxis.' La sama ĵurnalo de nun aperigos je la fino de ĉiu originala artikolo Esp. resumon. Imitinda ekzemplo!" (Junio **Muenchen**: "Dank' al la klopodoj de S-ro Hechtl, la 'Muenchner Sprachverein (Lingva Unuigo) decidis akcepti Esp. en sia instrua fako. Tio estas grava progreso de nia afero." **Regensburg**: "La Esp. Lega Rondo enhavas nun 93 membrojn."

Hispanujo.

(Junio) **Barcelona**: "La societo 'Paco Kaj Amo' (8) organizis belegan ekskurson. Gi aranĝis datrevenan kunvenon je la memoro de Dr-o Zamenhof kaj malfermos novan kurson." **Madrid**: "La komitato de la Zamenhofa Federacio eldonis du mil bruŝurojn pri la Ecclesekperimento, hispanen tradukitajn, por propagando en la instruistaj rondoj."

Nederlando.

(Februaro) **Zeist**: "La 26-28 decembro okazis ekspozicio, kiun ĉirkaŭ 500 internigitaj vizitis. En decembro oni varbis 40 novajn adeptojn. Post novjaro komencis novaj kursoj kun 70 lernantoj."

Polujo.

(Februaro) **Lodz**: La "biblioteko enhavas 359 librojn (7). Ilin uzas 100 legantoj. En novembro estis aranĝita (5) propagando-vespero (5) vizitata de 600 personoj. Por novaj kursoj sin anoncis 60 lernatoj." **Pabia-nice**: "Esp. societo fondiĝis. S-ro Huebscher gvidis kurson kun (5) 17 personoj." **Tomaszow**: "Je la datreveno de la naskiĝo de nia Majstro, estis aranĝita propaganda vespero, kiun vizitis 80 personoj. Kurso kun 26 personoj nun okazas. Notinde estas, ke la salono de la kunvenoj servis antaŭ 38 jaroj al D-ro Zamenhof, kiel loĝejo de vizito. **Zgierz**: "Ekzistas nun du grupoj de 34 anoj."

Portugalujo.

(Marto) **Lisbon**: "La Lisbonaj Esp-istoj efektivigis feston" la 18 januaro (5) memorigantan la datrevenon de nia Majstro. Estis "ĉe la Nacia Teatro, laŭ speciala permeso de la Ministro de l' Publika Instruado. Oni ne povus postuli pli bonan sukceson; la vasta kaj arta Teatro estis tute plena, kaj la programo la plej alloga. Ĉeestis L. M. la Prezidanto de la Respubliko kun la Ministro de l' Publika Instruado kaj estas notinda la fakto, ke L. M. la Prezidanto estis reveninta al Lisbono tiun saman vesperon post vojaĝo al nordo. Kiam la Prezidanto montrigis ĉe sia loĝio la publiko dum pli ol dek minutoj varme kaj entuziasme aplaŭdis lin." Interesa kaj ĝojiga estis la programo, el paroladoj, komedioj, kantoj, poezioj kaj orhestra muziko, en kiu, oni uzis la portugalan, francan, hispanan, italan kaj Esperantan (5) lingvojn. La neta enspezo estis por homamaj institucioj; "la Lisbona Esp. Societo, organizinto de la festo, nenion" ricevis "por si kaj tiu ĉi fakto igis la feston tre simpatia kaj aplaŭdinda, ĉar ĝi montris tiel la bonajn sentojn de la Esp-istoj. . . . La 13 januaro fondiĝis nova grupo, la 'Lisbona Verda Stelo.' Gi celas precipe la enkondukon de Esperanto en la laboristajn rondojn. U. E. A. estis oficiale reprezentita en la festo ĉe la teatro kaj en la fondo de l' nova Grupo.—B. M. d' A."

Rusujo.

(Februaro) **Blagoveščensk** (Siberio): "La revuo 'Edinie' (Unueco), organo de la Ligo de Studanta Junularo, malfermis Esp. fakon, direktatan de S-ro Korovič." **Kosmodemiansk** (Kazan): Nova societo "Antaŭen" fondiĝis; organizantoj estas gimnaziano. . . . **Petrograd**: Fondiĝis "Iniciata grupo de Fervojistoj-Esperantoj" kun 25 anoj. Prez.: P. Soroko, sekr.: N. Jahonov." (Aprilo) **Barnaul**: "Pastro Serišev gvidas unu kurson. Kursoj ankaŭ okazis en la popola gimnazio, kie Esp. estas oficiale enkondukita. **Kazan**: Estas organizitaj Esp. Studenta Rondeto kaj Esp. Sekcioj ĉe Gelernanta Unuiĝo de mezlernejoj." **Petrogrado**: . . . "La Esp.-socialista gazeto 'La Torĉo' daŭrigas () aperi." (Pri la novaj ŝtatoj antaŭnelonge partoj de la Imperio rusa, legu notindan artikolon de Edmond Privat en "Esperanto," Sept.-Okt., 1918.)

Svedujo.

(Majo) **Harnaes-Skutskaer**: "La klubo havis sian duan jarfeston, vizitata de ĉ. kvar cent personoj. S-ro E. Adamson la ĉefparoladon. Oni aranĝos novan kurson." **Stockholm**: "'Verda Stelo' laboras vigle kaj energie . . . La 28 Marto okazis tre sukcesa publika festo, sub protekto de la Finlanda ministro kaj de Princo Carl, estro de la Sveda Ruĝa Kruco. Partoprenis opera kantisto Briga Schuecker, kantistino Greta Lindstrom, aktoro U. Brander, k. a. Grava propagando ĉe la diplomataro kaj en la rondoj de Ruĝa Kruco." (Junio) "La Excelsior-Asocia komitato por Esp. propagando sendis al diversaj eksportfirmoj kaj komercaj institutoj trafan cirkuleron, kiu precipe celas atentigi pri la taŭgeco de Esp. kiel helpa lingvo (2) por komercaj rilatoj."

Svisujo.

(Februaro) **Zurich**: "La tri komercaj firmoj 'A Unger-Voelcks' (importado de nutraĵoj), 'Boeglin Leclair fils' (agentejo) kaj 'Unger & Co.' (Societe d' importation et d'exportation 'Comerca') praktike uzadas (2) Esperanton." (Marto) **Geneve**: "La arto kaj eduka gazeto 'Aujourd'hui' publikigis longan artikolon pri la pedagogia eksperimento en Eccles (1)." (Jul.-Aug.) **Lausanne**: "La gazeto 'l'Ukraine' publikigis interesan leteron de S-ro Ed. Privat pri la utileco, kiun prezentus la enkonduko de Esp. en la lernejoj de la nova Ukraina ŝtato." **Thuisis** (Graubunden): "Internigito H. Brueckenhaus gvidas kurson kun 9 partoprenantoj."

Nordameriko—Usono.

(Aprilo) **Chicago** (Ill.): "S-ro Chas. P. Lang, redaktas Esp. kursojn en la 'Skolto,' gazeto kun pli ol 200,000 abonantoj; la sukceso estas granda. Lecionoj ankaŭ aperas en la 'Internacia Skolto,' Enore, S. C. kaj en la 'Universala Skolto,' Webster, N.Y." (Majo) **Philadelphia**: "Dum la lastaj monatoj la lokaj samideanoj multe propagandis inter la Skoltoj . . . Nun almenaŭ ses anaroj ricevas instruadon. Je la naskotago de Georgo Washington, la Skoltoj kune kun la Philadelphia Societo havis feston . . . La ĉiutagaj jurnalaj plene raportis la okazintaĵojn, eĉ kun kliŝaĵoj." (9)

Sudameriko—Argentino.

(Januaro) **Rosario**: "La klubo aranĝis ekspozicion, kiu atingis kontentigan sukceson. Gravaj jurnalaj okupis sin pri ĝi, kaj ĝin

vizitis ĉ. 2000 personoj." (Marto) "La klubo" (Rosario) havas ĉ. 100 lernantojn kaj anojn; kursoj okazos."

Brazilujo.

(Januaro) **Rio de Janeiro:** La ĵurnalo 'A Norte' publikigis artikolon pri la progresoj de Esp. en la lernejoj de Rio."

Urugvajo.

(Majo) **Montevideo:** "Dum lasta jaro aktiva estis la agado de la Esp. Grupo. Oni algluis propagandajn afiŝojn tra la ĉefaj stratoj de la urbo; oni eldonis propagandajn poŝtkartojn, kaj en la sidejo de tiu societo estis organizataj (5) parolado kaj kurso kun kvindek lernantoj, sub la gvidado de nia Del. Artikoloj aperis en diversaj gazetoj . . . Tiu societo daŭrige kolektas materialon por organizi ĝustatempe gravan Esp. ekspozicion."

Azio—Japanujo.

Tokio: "Fremdaj Esp-istoj vizitis la grupon. Grava propaganda vespero estis aranĝita. D-ro Nakamura, Prof. D-ro Takaksu, Prof. D-ro Kroita paroladis; ankaŭ partoprenis per Esp. paroladoj du fremdaj samideanoj: S-ro R. H. Dick (sviso) kaj S-ro E. Gauntlett (anglo). Oni vendis multe da lernolibroj. S-ro Gauntlett gvidis kurson ĉe fraŭlina lernejo Sakurai-Fojiku. Festeno estis aranĝita je la naskotago de nia Majstro." (Junio) **Yokohama:** "La kompanio 'Swiss-Japanese Trading Co.' (drogajoj, hemiaĵoj, farboj), 92, Yamashita-Cho, uzas Esp. por sia korespondado."

Ĥinujo.

(Februaro) **Peking:** Ĉe la Ĥina Nacia Universitato, Esp. estas enkondukata en la programojn. Prof. K. Ĉ. Sunfizo, prez. de Ĥina Esp. Asocio, gvidas kvin kursojn, ĉe kiuj partoprenas entute 300 lernantoj. Dank'al tiu decido, oni povas antaŭkalkuli fortan antaŭenpuŝon de nia lingvo en Ĥinujo." (Junio) **Canton:** "S-ro Kon Seu-Lu restarigis la grupon." **Nanking:** "Oni fondis novan grupon sub la nomo 'La Verda Stelo.'"

Aŭstralio.

(Junio) **Brisbane:** "La klubo rekomencis kunveni. Notoj pri Esp. aperas en 'Stead's Review.' Kursoj estis aranĝataj." **Melbourne:** "Malgraŭ la milito, la societo kreskis. Ĝia raporto montras, ke la movado tie prosperas. Multaj artikoloj kaj notoj aperis en la gazetaro." **Sydney:** "Okazis la jara kunveno de la Zamenhofa klubo. De post la lasta jara kunveno la membraro kvarobliĝis, precipe dank' al la artikoloj ĉiumonate aperantaj en 'Stead's Review,' granda aŭstralia revuo, gvidata de la filo de nia bedaŭrata samideano W. T. Stead."

Afriko—Maroko.

(Aprilo) "Ni ricevis kelkajn informojn el tiu lando: S-ro Ch. Thollet malfermis ferajejon (5) de la 'Verda Stelo' en **Kenitra**. S-ro Richard en Tanger kaj Sazy en Rabat restis fidelaj reprezentantoj de nia movado en Maroko."

Britujo.

a. La raportoj pri la movado en Granda Britujo sendubigas la leganton koncerne la aktivecon de tiu lando, kaj pro ĝia bona ekzemplo mi elektas citi kaj resumi precipe de la British Esperantist, 1918; ĉar mi opinias ke estas speciale kuraĝige certigi pri tia solideco kaj antaŭenemo kian nia Britaj samideanoj elmontras.

b. Jen elĉerpajo de letero kiun S-ro W. M. Page, redaktoro de

“The Esperanto Monthly,” skribis al mi la 5an majon: “Mi hodiaŭ ricevis vian leteron de la 18a de aprilo, kaj ĝojas respondi. Esperanto faras kontentigan progreson en Skotlando. Tuj post la eksplodo de la milito la antaŭenirado iom ekmalrapidiĝis, la junaj viroj preparis por la militservado anstataŭ ĉeesti la grupojn, la pli maljunaj fariĝis voluntuloj kaj honoraj policistoj, virinoj fariĝis flegistinoj kaj alimaniere partoprenis en nacia servado. Sed post tri jaroj niaj grupoj alktimigiĝis al la novaj kondiĉoj kaj en la lastaj monatoj jen ĉi tie jen tie estas signoj de vigleco. Precipe en Glasgow la afero bone iras. Kursoj starigis en du gravaj publikaj lernejoj kaj inter la socialistoj. En Edinburgo kaj Leith granda intereso vekigis inter la infanoj. Dum tri publikaj paroladoj mi donis objektleciojn al proksimume dekdu infanoj, kiujn mi antaŭe ne vidis, kaj ĉiuokaze la eksperimento estis tre trafa kaj la infanoj postulis pluan instruadon. En Donaldson's Hospital, grava instituto en Edinburgo, oni nun instruas Esperanton, kiel parto de la ĉiutaga lecionaro. La infanoj faris mirindan progreson. En Cowderbeath, urbo, kiu rapide grandiĝis dum la lastaj jaroj, oni havas tre viglan grupon, kiu invitis la skotan federacion kongresi ĉe ĝi en junio.

c. “Ni atentigas pri la grava subteno de nia afero, kiun donis la Registara Komitato pri Modernaj Lingvoj, proponante specialan komitataton por esplori artefaritajn lingvojn. La serioza konsiderado, kiun donis tiu komitato al Esperanto faris gravan impreson sur edukistojn. Ni nuntempe havas grandajn reklamojn en la edukistaj gazetoj, kiuj alportis al ni multe da demandoj pri Esperanto. . . . Mi esperas ke vi bone sanas, kaj ke via kongreso ĉe Greenacre forte helpos nian aferon ĉe vi.”

d. Por mi, unu el la plej impresaj distingoĵoj de Brita Esperantago (5) estas la listo de Grupoj kaj Societoj, aligitaj al la Brit. Esp. Asoc., kiu regule aperas sur la dua kaj tria kovraj (5) paĝoj de la “British Esperantist.” La pli ol cent nomoj de urboj kaj urbetoj en kiuj la movado estas reprezentata, signifas multon. Jen la citado de la unuaj tri vicoj:

Accrington: Mrs. Roberts, 64 Devonshire Street. 54 Blackburn Road, Monday and Saturday, 8.

Addlestone (Surrey): C. M. Baylis, Ashlet Home School Addlestone.

Banbury: Mrs. Braggins, 18, Calthorpe Road. At the house of Mrs. Gillett, “The Elms.” Tuesday, 8-9.

Kiu lando aŭ kiu asocio estas duone tiom reprezentata? Kompreneble neniu. Sur la kovrilpaĝoj (5) de la Amerika Esperantisto ne estas kvarono de tiu nombro.

e. Ankaŭ impresa estas la kroniko, raportante pri la agado de Brita Esperantistaro. Sub la rubriko “Elsewhere” (aliloke), t. e. ekstere de Londono sed okaze inklusive de Aŭstraliaj urboj, estas meznombro, ĉiumonate, 14 rubriketoj. (Tiu meznombro estas kalkulata (5) de la Jan.-Nov. numeroj de 1918.) Aliaj regulaj rubrikoj estas “London” kaj “Coming Events” (okazontajoj), kaj de tempo al tempo la rubriko “General” estas aldonata. Entute, tiu konstanta raportado de interesaj kaj gravaj aferoj sendube fortigas la movadon. Se en Nordameriko ni informiĝas sammaniere pri nia aktiveco, helpus multe, kaj se ni de longe estus havintaj tiun informon, hodiaŭ nia samide-

anaro estus multe pli granda. (Ŝajnus, ke ni bezonas forton por povigi la kronikadon kaj ni bezonas la kronikadon por doni al ni la forton,—rondaferon.) Sed kiu Esperantolando havas gazeton kun kronika fako komparebla je Britujo? Mi emfazas (5) tion, ne por laŭdi Britujon, sed por atentigi al kio (5) ŝajnas al mi tre imitinda normo kaj vigleco.

f. Tial, se la ĝeneralaĵoj plaĉas, kiel la detaloj? Responde al tiu mi kelke citos kaj resumos el diversaj 1918 numeroj de "The British Esperantist."

(Jan.) **Bristol:** "Tiu ĉi grupo faras kontentigan progreson. Ni nun estas aranĝintaj du kursojn en apartaj ĉambroj, unu por lernantoj kaj alia por spertaj. Lastatempe ni faris multe da propagando sendinte la broŝuron 'The Modern Humanity' kun aliaj propagandiloj al ĉiu el la **Council** lernejoj, en Bristol, al la altgradaj lernejoj kaj al la sekretario kaj komitato de la Eduka Komitato, ankaŭ al la estroj de la knaboskoltoj. Tio nur estas la komenco de propagando inter la lernejoj. Antaŭnelonge vizitas nin S-ro Applebaum el Liverpool kaj lia raportio pri la progresado de nia lingvo tre kuragiĝis la samideanojn ĉi tie. Sendube tiu ĉi antikva urbo plenumos gravan rolon en la Esperanta movado, kiam la urbanoj komprenos ĝian signifon, kaj tial "ni semas kaj semas neniam laciĝante." "Ni ŝuldas multe al la subtenado kaj helpo de **The Workers' Educational Association.**"—U. F. W.

g. (Majo) **The Esperanto Week-End** (semajnfintagoj), Whitsun (Pentekosto), 1918. Anonco de okazontaĵoj vendredo-lundo, majo 17-20, kiam oni havos Esperantan teatraĵon, datrevenon de D-ro Zamenhof (kun antaŭtemaĝo), dimanĉan diservon, propagandan kunvenon (ĉe "Hyde Park"), specialan kunvenon organizitan de la B. E. A. Literatura kaj Debata Societo, jarkunvenon de la B. E. A. kaj neformalan koncerton. Grava estis la Zamenhofa kunveno (raportota en la junia B. E.), kiu estis por la publiko, kiam estis legataj multaj leteroj de eminentuloj, inter aliaj: lia moŝto Bryce, S-roj H. G. Wells, Zangwill, ktp. D-ro Pollen resumis la famajn sugestiojn, kiujn D-ro Zamenhof faris ĉe la komenco de la Milito.

(Junio) **Kunveno de U. E. A.:** "Sabaton la 11an de Majo okazis tre bona kunveno de membroj kaj amikoj de la U. E. A. ĉe Morley College, sub la prezido de D-ro Pollen. Ĉeestis bona nombro da Esperantistoj (ĉirkaŭ 120), kiuj aŭskultis atente al raportoj legita de D-ro Pollen pri la ĝenerala agado de la Asocio dum la milito, kaj al resumo de la Londona agado de S-ro Blaise, Ĉefdelegito, kaj liaj helpantoj. S-ro Blaise interese pritraktis la multajn kaj diversajn servojn, kiujn li povis plenumi, eĉ dum la nunaj cirkonstancoj, por la membroj de la Asocio, kiu sendube post la milito fariĝos eĉ pli necesa kaj utiliga ol antaŭe."

Sabataj Posttagmezoj. Tiukaze, la Esperantistoj de Londono, ktp, rendevuas ĉe anoncita loko, vizitas parkojn, ĝardenojn muzeojn kaj aliajn dezireblojn, por plezuro kaj ekzercado en Esperanta parolado. Bonege. Mi tradukas la anoncon de la Novembro B. E., jen: "La vintra serio de endomaj kunvenoj por ekzercado (5) en Esperanta konversacio komencos novembron 2. La kunveno por ĉiu sabato (8) en novembro, krom (5) la 16a, estos la Brita Muzeo, teretaĵo (ero de kiu estas nun remalfermata). Rendevuo—2:30 ptm, en la vestiblo. 4:00 ptm, tetrinko ĉe la 'Empress Dairy' (laktajvendejo) kontraŭ la

B. E. A. oficejo, en (5) Hart-strato. Ĉiuj Esperantistoj estas invitataj." La tutmonda Esperantistaro sekvu tiun ekzemplon! Ĉu vi supozas ke la ĉestantoj senescepte parolas la karan lingvon? Estus tro bone por esti vere; sed mi citas la sekvan de unu el la monataj avizoj: "Nepre videble portu la verdan stelon; forlasu, dum du horoj, la nacian lingvon, persiste parolu kaj aŭskultu nur la internacian." Tiu citaĵo ŝajnas al mi inda de ĝenerala uzo kiel moto por ĉiu grup-festo aŭ festeto, kie oni vidigas publike. Fakte, unu el miaj celoj, en la (ne jam finita) elserĉado por la stato de Esperanto, estas trovi praktikojn, regulojn, ktp, kiuj, pro la spertoj de iuj grupoj, verŝajne taŭgos por aliaj. Vidu la parton 4, de tiu ĉi raporto (Konduko). Ĉe nia bona Greenacre Kunveno, lastan someron, kiam iufoje, mi, kiel unu el la estraro, rimarkis emon troparoli la anglan lingvon (senkulpeblan emon, ĉar ni estis gastoj de la Bahaanoj, la plimulto el kiuj ne parolis Esperanton (5), mi elpensis la ideon de Esperantujo sur la verando. Laŭe, mi invitis kelkajn samideanojn kunsidu kun mi sur cirkle grupita seĝaro kaj donu al mi, po ĉiu, kvin cendojn (ĉ. unu spescenton). La simpla regulo estis, ke, se dum konsentita tempo ia persono ne estus parolinta angle, li rehavus lian enspezon; sed ke por ĉiu aparta frazo aŭ vorto angleparolita li perdus la rajton por rehavi unu el la kvin cendoj (tiel perdante la tutan rehavraĵon post kvin ofendoj). Tiu spritajo funkciis tiom trafe, ke mallonge poste mi, kiel prezidanto, alprenis la metodon por nia Bostona grupo, kaj mi certigas ke ĝi helpas multe la realigon ke nia klubĉambro estas ero de (5) Esperantujo. Tiumaniere la klubkaso kreskas eble po ses cendoj semajne, kaj la bona samideano estas li kiu ofendas precize kvinfoje ĉiukunside, kaj la malbona estas li kiu enmetas sian sumon kaj "malsumas" la tutan sian (ĉar pro timo li silentadis). Tamen, mi serioze opinias ke la plano nepre helpas la paroligon kaj vigligas la kunvenon, ĉar ĝi antaŭenigas ridindadon.

i. Pardonu tiun deflankigon, kaj nun ni atestigu alian aferon, kiu estas notinda: la regula monata diservo ĉe Harecourt Preĝejo, Londono, kiam oni havas malsamajn paroladantojn ĉiuokaze. Mi rimarkas la nomojn de niaj bonekonataj Ges-roj Blaise inter tiuj de 1918, kaj mi konjektas ke S-ro M. C. Butler, la ĉiafunkciulo, deĵoris la okazojn por kiuj oni ne antaŭanovis la paroladontulon; ĉar mi aŭdis lin, kiam, unufoje mi ĉeestis la diservon antaŭ kvar jaroj. Sed, en la B. E. de la nuna jaro mi legas pri almenaŭ unuopa diservo en la urboj Bradford, Chorley kaj Wisbeach. Kial ne tiu kutimo en multaj lokoj? Ĝi estas aldono ke nia kursaro verŝajne enhavas kelkajn Bahaanojn (vidu "Esperanto," feb. k. mar. 1918); ĉar ili interesigis, ne nur pro sia gastingo de nia lasta kongreso, sed des pli (5) pro la antaŭkelkjara volo de sia majstro, Abdul Baha. Diservo Esperanta kompreneble estas familiara afero ĉe niaj naciaj kaj internaciaj kongresoj; kaj neforgebla estos la okazito de la amerika kongreso ĉe Annapolis, 1916, kiam nia fervorulo, Pastro James L. Smiley (kiu Esperantigis multon de la Episkopa preĝlibro kaj himnoj) ne nur predikis sed, dum la kongreso, solene edzigis niajn samideanojn, F-inon McCaffrey kaj S-ron Horn. Mi atestis la ceremonion, kaj hodiaŭ mi gratulas min ke ŝi (en Kalifornio) aliĝas al nia propaganda komitato. Mi havas kialon esperi ke baldaŭ venos la tago kiam la Bahaanoj regule kondukos diservon en nia lingvo, akorde (mi opinias) kun la multaprobo de Abdul Baha.

Tiam, je ilia kutimo, mi atendus ke la Esperantistoj de (5) aliaj kredoj komencos similfari, kaj tio devus treege helpi la akceptadon de Esperanto tra la mondo. Mi menciis (5) diservon en Britujo kaj Usono; sed ĝojus aŭdi la plendon ke mi devis mencii la saman aferon tie, kaj tie kaj tie. Certe mi respondos "Dankon," aldonante ke sub nunaj cirkonstancoj estas tre malfacile ekscii la faktojn pri nia internacia movado ĉie.

j. Ĉu mi jam finis la reklamon de Brita progreso? Ne ankoraŭ. Mi devas ekzempligi la B. E. A. Literaturan kaj Debatan Societon (9), kies nomo mem preskaŭ elmontras ĝian celon. La Literatura Enketo, en la B. E. (majo) estas citinda, jen:

"1. Ĝi donos al verkontoj kaj tradukontoj la dezirojn kaj opiniojn de la Esperantistaro de la brita imperio.

"2. Kredeble ĝi instigos la verkadon kaj tradukadon esperanten (5) de aliaj verkoj.

"3. Pro la grandaj malfacilaĵoj de la nuna tempo, estas ne dezirinde eldoni librojn ne multe bezonatajn de la Esperantistaro. La enketo montros kiujn kaj kiajn librojn oni plej volonte aĉetos.

"4. Ju pli disvastiĝos nia lingvo, des pli oni bezonos specialajn verkojn; kaj la enketo, havante la opiniojn de la plimulto, helpos la kompiladon kaj eldonadon al tiaj libroj. Ekz.: lernejaj libroj, ktp."

Tiam sekvas naŭ demandoj, post kiuj la diraĵo: "Ĉiu sperta esperantisto (5) rajtas aniĝi al la Literatura kaj Debata Societo. Se ano de B. E. A., senpage.

Petu regularon kaj aniĝilon de la Sekretario.

Se vi loĝas ekster Londono, ne kredu, ke estas neutile por vi aniĝi al la societo. Ni havas laboron kaj plezuron por vi ankaŭ.— C. H. E."

La hon. sekretario estas S-ro Charles H. Edmonds, 254, Wightman Road, London, N. 8. (Estus taŭge ke eksterlandanoj sendu respondkuponon aŭ alian poŝpagilon.)

Ĉe la kunveno de la Societo iom post la elsendo de la demando, la sekretario "enkondukis diskuton pri la demando pri Literatura Enketo kaj preparolis la respondojn al ĝi, kiuj donis materialon por multe da pripensado. Li skizis la estontan pozicion de la literatura Societo en la esperanta movado kaj plue klarigis pri ĝia rondiranta gazono **Literaturo**."

k. En la B. E. por oktobro estas la jena pri tiu societo: "La societo, kiu nun havas pli ol cent membrojn, jam bone laboras kaj per la du tradukaj rondoj faras la tradukadon de **Water Babies** kaj **Tale of Two Cities**. Efektive tiom da membroj helpas per tradukado, ke oni baldaŭ starigos ankoraŭ unu rondon, por ke ĉiu havu laboron. Oni petas samideanojn, kiuj povos helpi per tradukado, skribi al la sekretario. Lastatempe la societo eldonis **La Granda Vizaĝo el Ŝtono**, de Hawthorne, tradukitan de E. E. Yelland (prezo, 9p. ĉe B. E. A.); tiu, kiel la antaŭaj eldonaĵoj, espereble bone vendiĝos."

l. Bona oficiala informo pri tiu societo estas en la reklamo, kaj komence (5) en la julia numero, aperas regule en Esperanto Monthly (p. iii). De la reklamo en la nov. nro. mi resumas kaj citas jen:

Sub la rubriko **Literatura Festo** oni anoncas parton de programo por nov. 16, kiam estos legado kaj deklamado "el tradukoj kaj originalaĵoj verkitaj de membroj de la societo kaj oni povas atendi inter-

esplenan kunvenon. Ankaŭ oni prezentos komedieton tradukitan el la pola lingvo." Sub **Traduka Rondo No. 3**, kiu estas starigita por traduki "Cranford," de S-ino Gaskell, oni petas ke "samideanoj skribu al la sekretario pri proponoj pri helpo" por tiu kaj aliaj verkoj. Sub **Al Verkistoj**, oni avizas, ke estas ĵus trovite ke traduko de la verko "Tale of Two Cities" (kiun la societa "rondo" tradukadas) jam ekzistas. "Kia malŝparo de energio! La komitato petas—ne, **petegas** ĉiun samideanon kiu faris aŭ faras tradukon skribi al la sekretario pri tio." Sub **Eldonaĵoj**, estas la anonco ke la societo "havas kelkajn bonajn manuskriptojn—inter ili estas traduko de 'Midsummer Night's Dream' kaj tradukoj el la verkoj de Dickens kaj aliaj famaj aŭtoroj. Tuj kiam la financa stato de la societo tion permesos oni eldonos tiujn verkojn. Se vi volas pligrandigi nian literaturon sendu donacon nun." Sub **Ĵurnalrondoj**, estas: "Membroj de la societo povas aboni al 10 eksterlandaj gazetoj por 5s jare. Por efektiviĝi la planon oni bezonas kelkajn aliajn abonantojn. Skribu tuj." (Mi mem deziras aboni kaj pro tio kiel pro pli gravaj kialoj, mi deziras, senprokraste, fariĝi membro de la societo.) Sub **"Week at Esperanto"** (Semajno je Esperanto) estas: "Baldaŭ aperos pligrandigita kaj plibonigita eldono de tiu ĉi verko. Ĝi estas certe la plej konvinka propagandilo." Sub **Enketo pri Esperantaj Kantoj**, estas: "La sekretario bezonas helpon de ĉiu kiu posedas kantojn en Esperanto. Sendu por detaloj." Fine, oni anoncas **"Fotografajo de la Majstro**. Bele farita de Aŭtotype Co. (mezzotint), sur la papero 13 x 16. La plej bela havebla kaj ĝi estas plej bona memorajo de nia amata majstro kiun vi povas havi. 2s. 10 d. (ĉ. Sm. 1.4), pakita kaj afrankita de B. E. A., 17 Hart Street, W. C." (Londono.)

m. Sufiĉe por novaĵo rilate tiun bonan societion. Volu (5) ke estus similaĵo en mia apudejo. Ni havas en nia Bostona societo tion kion ni nomas la Spertularo, kiu eble rekunvenos el ĝia promilita (5) dormado. Dum niaj kelkaj kunsidoj estis iom da promeso de grava afero, sed, ŝajnas, ke eble ni bezonas definitivan celon, aparte de laŭvola interparolado aŭ senpreparita diskutado por paroladpraktiko (5), se ni volus havi viglajn kunvenojn. Mi ŝatus ke nia entrepreno estu filio de la brita, aŭ eble de la Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Verkistoj, se tiu nun funkcias.

n. Nu estas io aldone brituja ankaŭ atentinda? Certe. Ekzemple en la lasta de mi ricevita nro. de la B. E., nov., estas trafa artikolo sur unua paĝo, angleskribita kaj titolita **National Library for the Blind**—Esperanto Section (Nacia Biblioteko por la Blinduloj—Esperanta Fako). Esperantigante mi resumos ĝin, ĉar mi opinias, ke nia movado inter kaj por la blinduloj estas tre grava; speciale nun, kiam tiom da soldatoj blindiĝis en la milito. La artikolo diras, ke la Esperanta Fako de la Nacia Biblioteko enhavas ne malpli ol 500 volumojn en Esperanta Brajlo. Tiu fako nur komencis en 1909, kaj ĝia grandeco tute ŝuldas al la energio kaj bonvolo de malmultaj samideanoj. La nuna postulo por Esp. Brajl-literaturo estas konsiderinda; ĝi estas granda konsolado. Notu, ke la kosto de la Brajla presitaĵo estas granda, kaj ke la malfacilaĵo al la blinduloj lerni eksternaciajn lingvojn estas granda. Plue, la volumoj estas dikaj kaj necesigas multe da spaco. Tial, per Esperanto, la blinduloj multe profitas. Oni laŭdas la energian fakan sekretariinon, F-inon H. E. Boord, kiu volus memo-

rigi la legantojn, speciale la grupsekretariojn, ke la fako atendas ilian helpon por la blinduloj, samtempe por Esperanto. Ĉe la Cambridge Kongreso (1907), voĉdonigis ĉe la kunveno por la blinduloj, ke oni penu instigi ĉiun grupon alpreni ('adopt') almenaŭ unu blindan anon."

Bonege! Ĉu ni povus trovi tian Esperantisman alilande, mi ne estas certa; kvankam tiu movado en Svedujo kaj en Germanujo, mi kredas, estas ŝatinda; kiel, kompreneble, en kelkaj aliaj landoj.

Mi devus havi pli da tempo antaŭ la eldono de tiu ĉi raporto, se mi ĝuste priskribus la tutan movadon inter la blindularo. Mi ĝoje rememoras la bonan laboron de nia Bostona samideano, S-ro Edward K. Harvey, kiu bedaŭre mortis. Li instruis la blindulojn ĉe la fama Perkins Instituto, kaj ĉeestis la Trian Kongreson (Cambridge, 1907), tien kondukante du aŭ tri blindajn samideanojn, kun kiuj li poste vizitis Rusujon. En tiu lando li trovis veran uzon de nia lingvo, kiel li klarigas per sia entuziasma raporto, reveninte al Bostono. Depost lia morto (1908), neniu trovigis instrui la lingvon ĉe la sama institucio; sed, la skribo mem de tiu fakto memorigas min priatenti tiun aferon, kaj baldaŭ. Se la blinduloj bezonas kaj ŝatas la internacian lingvon ialoke, iafoje, kial ne ĉialoke ĉiafoje? Mi suspektas ke la riproĉo estas je la Esperantistaro, el kiu mi ja estas ero. (Kredeble estus helpo al la rekomenco de la grava laboro tie ĉi, se fervoruloj konsile skribus al mi, aŭ al Amerika Esperantisto.) Bedaŭrinde, la domamata samideano, Clarence Bicknell, kiu tiel sindone helpis la propagandon inter la blinduloj, ne plu estas en niaj vicoj. La tuta historio de tiu aspekto de nia kaŭzo devus esti ĉiam ĝisdata afero kaj en la zorgo de iu, kiun nia internacia estraro (se tiu ekzistas) oficialigos.

Mi devas rapidi kaj mallongigi preskaŭ ĉiun sekvan aludon, nur sugestante la plej grandan parton de la elsciindaĵoj. Memoru, ke mia nuna celo estas precipe montri per ekzempleroj, kion, pogrande, ni devas havi en oficiala jarlibro.

La Eklezia Esperantista Ligo. Kio estas tio? Tiu, fondita antaŭ malmultaj jaroj, estas bone priskribita (angle) per unupaĝa artikolo en B. E. por Jan. (5), 1918. En la maja nro. (5) ĝi reklamas (angl. k. Esp.), kaj mi citas jen: "Al ĉiuj nebritaj Geesperantistoj: Aliĝu al la Eklezia Esperantista Ligo. La Ligo energie laboradas inter ĉiuspecaj kleruloj, edukistaj societoj, universitatoj, k.t.p.; kaj precipe celas (1) gajni subtenadon de ĉiuj kristanoj por Esperanto; (2) sciigi la tutan Kristanaron pri la uzindeco de Esperanto por la pligrandigo de la Regno Dia. Ĉiu, kiu ne apartenas al la Eklezio Anglikana, povas aliĝi kiel asociat(in)o. Kotizaĵo: Sm. 1.500 ĉiujare. Skribu al: Rev. A. J. Ashley, Hon. Sec. of the C. E. L., Farnley Tyas Vicarage, Huddersfield, Anglujo."

La sekva! Mi ricevis unupaĝan cirkuleron (antaŭ kelkaj monatoj) titolitan "Al viroj kaj virinoj en ĉiu Nacio, kiu celas sekvi Kriston. Alvoko de la Religia Societo de Amikoj en Britujo." Post la alvoko sekvas jen: "Ĉiu, kiu deziras esprimi aprobon de ĉi tiu alvoko, skribu al 'The Message Secretary,' Devonshire House, 136, Bishopsgate, London, E. C. 2, de kiu oni povas ricevi pluajn ekzemplerojn. Copies may also be had in English if desired." Lastatempe, mi ne legas pri tiu "Amiko" afero, sed mi esperas ke la Societo bone sukcesis per ĝia Esperantismo. Supre mi aludis al la Bahaanoj, kaj ni de longe scias

pri Katolika intereso en la lingvo (per unu aŭ pli Kat. Esp. gazetoj); kaj ni devus ĝoji ekscii pri multaj sektroj, kiuj alprenus la internacian lingvon por interuzo aŭ por propagandi siajn celadojn — Mahometanoj, Zoroastroj, Teozofistoj (5) ktp. Kial ne? Eble multaj nun tion faras nekonataj publike aŭ per la Esp. gazetaro; ĉar en la Tutmonda Jarlibro Esperantista, 1913-14, estas listo de pli ol tridek "internaciaj fakaj asocioj kaj institucioj." Inter ili estas Teozofia Ligo (5); sed mi opinias ke ĝi, kiel la plej granda multo el ili, preskaŭ ne funkcias escepte rilate la mondkongresojn de la tuta Esperanta movado.

La sekva! **Scienca Asocio Esperantista**, kies organo estas "La Teknika Revuo." Vidu 7—Bibliografio (5).

La **Moderna Lingva Komitato**. Vidu 2—Uzo.

La **Komuna Komerca Lingva Komitato**. Vidu 2—Uzo.

Krom (5) la letero de S-ro Page, el kiu mi citis, ankaŭ mi ricevis pli ol dudek aliajn, kies interesajn enhavojn mi ĝojus citi en parto aŭ resumi, sed de la statistika vidpunkto ili ne aldonus multon al supra skribaĵo. Tamen mi tre ŝatas ilian ricevon, kaj mi intencas certigi ke la skribistoj havu ekzempleron de tiu ĉi artikolo.

Grava estas la novaĵo kaj multe de la enhavo de la Sep.-Okt. Nro. de "Esperanto," kiun mi ricevis en decembro, tro malfrue por uzo en tiu sekcio; sed en Sekcio 8 (Miksajo) mi havos aldonon al Sekcio 1, en kiu mi povas aludi al lastatempaj aferoj en la Esp. mondo.

Sufiĉe nun por Esperantujo. Sekve (5) estas

1—Studo

Mallonge devas mi trakti pri tiu gravega temo, kiu meritas tutan kajeron (5) de la gazeto A. E. Kaj la fakto ke nia nacia asocio havas sian specialan kom. pri Esp. en la lernejoj, estas bona verŝajneco por monografia eldono koncerne tion.

La fama "Eccles" Eksperimento multe priskribiĝis, kaj ĝia priskriba broŝuro, The Modern Humanities (Modernaj Klasikaĵoj) jam tradukiĝis en la francan, la svedan, kaj (mi opinias) la hispanan lingvon. Kio ĝi estas? Ĝi estas la unua provaĵo de la enkonduko de la lingvo en popollernejojn kiel parto de la regula lecionaro. Tio komencis en la jaro 1916, kaj nun oni instruas ĝin (laŭraporte) inter la lecionaro en almenaŭ dekduo da lernejoj en diversaj lokoj kaj landoj. Sed precizigi la nombron, la sukceson kaj daŭrigadon, estus ĉu (en ĉiuj el tiuj lernejoj) la estraro aprobas la instruadon, sen kontre dezirinde; kaj pro tio mi volas demandi anstataŭ raportoj, jen: (1) traŭa voĉo? kaj ĉu ili rekomendus ĝin al ĉiuj samgradaj lernejoj tra la mondo? (2) Ĉu ili konsentos ke, se oni volus studi ĝin fremdan lingvon, li povus lerni tian lingvon pli bone dum naŭ monatoj per la studado de Esperanto kaj ne la lingvo lernota dum la unuaj tri monataj, ol per la studado de la lingvo lernota dum la tutaj naŭ monatoj? Mi opinias jes, se oni deziras precipe la paroladpovon kaj ne, se oni deziras la legadpovon. Sed, kompreneble nuntage estas la parola arto kiun personoj volus akiri de modernaj lingvoj. (3) Kio estas la atestado de la infanoj kiuj jam studis la lingvon Esperanto? a. Ĉu ili ŝatas ĝin? b. Ĉu ili deziras daŭrigi ĝin uzi? c. Ĉu ili konsentos ke ĝi helpas al la lernado de aliaj lingvoj? (4) Ĉu la gepatroj kaj parencoj same konsentas, kaj ĉu multaj el ili interesiĝis lerni la lingvon? (Respondu al "Amerika Esperantisto.") Dume, mi enmetas la sekvan

liston da lokoj en kiuj, mi komprenas, la infanoj havas, hodiaŭ, lernejajn kursojn en Esperanto: Bishop Auckland, Durham, Eccles, Edinburgh, Hastings, Keighley, Leeds (Britujo); Christiania; Barnaul (Siberio); Rio de Janeiro. Komprenable tiu listo ne estas kompleta; sed bonvolu informi la "Amerika Esperantisto" se vi konas aliajn. Per tio la lerneja kom. siatempe informigos por la bona raporto, kian, mi estas certa, ĝia membraro prezentos. (La estro de tiu komitato estas D-ro Lowell, unu el la plej ŝatindaj eminentuloj el nia lando.)

Kiel lerni kaj lernigi la lingvon, estas trafaj demandoj, kiujn, bonvole la lern. kom. priskribu. Sufiĉe, se nun mi diras ke estas multe da konsilo presita rilate tiun gravan aferon, kaj ke tio estas unu el la precipaj celoj de la "Esperanto Monthly." Ekzemple, mi atentigas al la nro. por Feb., 1918, en kiu estas, p. 12, artikolo "How I Learned to Speak Esperanto" (Kiel mi lernis paroli Esperanton), kaj en la Mar. nro. alian samtitolitan. Ankaŭ estas daŭriganta artikolo en 1917-18 eldonoj de la sama gaz., titolita, "Practical Suggestions for Teaching Esperanto to Children" (Praktikaj sugestioj por la instruo de Esp. al la infanoj).

Federacio de Lancashire kaj Cheshire.—La tria Konkursfesto aranĝita de ĉi tiu Federacio estis speciale por geknaboj sub la aĝo de 15, kaj okazis en la Urbdomo, Eccles, Lancashire, je la 1a de Decembro, 1917.

Dum kelkaj monatoj oni instruis Esperanton al la geknaboj en la Green-lane kaj Beech-street lernejoj en tiu ĉi urbo, kaj la plej multaj el la enskribitoj ĉe la Konkursfesto apartenas al ĉi tiuj lernejoj.

La Urbestro de Eccles, Councillor Hallsworth, malfermis la Feston, per kontentigaj vortoj bonvenigante la delegitojn, kiuj ĉeestis el la diversaj grupoj en la Federacio. Li esprimis la deziron kaj esperon, ke la afero estu granda sukceso, kaj sentis sin fiera, ke lia urbo estis la unua en la lando enkonduki Esperanton en la taglernejojn.

La Prezidanto de la Federacio, S-ro J. D. Applebaum, anoncis ke entute 135 geknaboj enskribiĝis en la diversaj konkursoj literaturaj, deklamaj kaj kantaj.

La Gesinjoroj Blaise (Londono) tre komplezeme juĝis la literaturajn konkursojn, kaj raportante pri la verkoj de la geknaboj diris, ke ili estis sufiĉe malfacilaj kaj bezonis longan tempon kaj tre detalan kaj skrupulan atenton por alveni al kontentiga decido. La aljuĝoj faritaj de ili estas jene:—

Konkurso 1. Imaga korespondajo en Esperanto, entute ses leteroj, inter du infanoj,—unu angla, kaj la alia hina.

Konkurso 2. Imaga konversacio en Esperanto inter angla knabo, perdita en Petrogrado, en kiu urbo li estis vizitanta kune kun siaj parencoj, kaj rusa knabo, kiun li renkontis subite kaj kies verdan stelon li vidis.

Konkurso 3. Traduko el la libro Esperanta, "Travivaĵoj de Ro. So."

Konkurso 4. Traduko en Esperanton el angla legolibro "Books for the Bairns, No. 249."

Speciala mencio estis farita de la juĝantoj pri la verko de Fraŭlineto Rita Applebaum, la okjara filino de la Federacia Prezidanto, S-ro Applebaum. Tiu ĉi verko estis mirinda peno de knabineto tiel juna kaj preskaŭ atingis la rangon de la premiito kaj atestitoj. Pro tio la afablaj juĝantoj sendis al ŝi specialan premion.

Konkurso 5. Traduko en Esperanton de la angla poemo "The Battle of Blenheim," by R. Southey.

2—Uzo

Tiu interesa kaj grava temo iom interplektiĝas kun 3—Propagando. Tamen, pri ambaŭ mi nun skribos nemulte, ĉar, ne sole mankas la tempo kaj la spaco, sed ankaŭ ili apartenas al la temo, kiu mi esperas ke ni havos por la premia tago (la kvina sabato en marto, pri kiu vidu 9).

Lastatempe ni komencas legi multon pri Esp. en la komerco, kaj mi citas nomojn de firmoj (listitaj en "Bulteno de la Kataluna Esperantista Federacio" por Jun.-Jul., 1918, en artikolo de Maugeis de Bourguesdon, el "Franco Esperanto," trad.). Ĝi citas "les Grandes Magasins du Bon Marche"; la librejoj Taride kaj Hachette, la Manufacture d'Armes de Saint-Etienne, la fabriko de plumoj metalaj Baignol et Farbon, la parfumvendejo Gelle Freres; la firmoj de ĉampanvinoj Moet et Chandon; la bicikloj Terrot et C.a, la aŭtomobiloj Rocher et Schneider, de Dion-Bouton, Clement-Bayard; la foto-grafiaj paperfolioj Lumiere et Joucla; la firmoj Gaumont Ch. Mendel; la fama agentejo pri vojaĝoj Cook et Sons, kiu ekfondis, helpite de unu el siaj plej bonaj agentoj, M. Marshall, komitaton por komuna komerca lingvo, kaj multe propagandas kun celo akceptigi Esperanton kiel tian. (Tiu agentejo uzas Esperanton de post kelkaj jaroj.)" La artikolo estas represinda, kaj mi esperas ke multaj el la Esp. gazetoj presos ĝin. Bedaŭre, ni ne havas la spacon reprodukti ĝin en tiu ĉi kaĵero. Unu konvinka paragrafo, tamen, mi devas citi, jen: "Pro iniciativo de grava, londona komercisto, S-ro Barton Kent, okazis, antaŭnelonge, propaganda parolado en "Rotary Club grupo de komercistoj, kies gravecon oni bone konas. S-ro Barton Kent fariĝis ne nur konvinkito sed ankaŭ propagandisto, pro la fakto ke unu el liaj konkurantoj, S-ro Gueritte, ricevis el Rusujo pere de Esperanto, mendon da 250,000 frankoj" (centmil spesmiloj). Tiu cifero estas signifa. Ĉu iu alia samideano povas citi similan profiton? Se ni havus dek aŭ pli el tiuj, kompreneble la komerca mondo senprokraste esperantiĝus. Mi rimarkas en flugfolio (1917?), eldonita de la B. E. A., "Esperanto in Commerce" (Esp. en la komerco), ke S-ro R. Richez, marmora komercisto, Geneva, skribis (trad. el la angla): 'Antaŭ kelkaj jaroj, dum komerca vojaĝado en Holando, mi trovas malfacilon en la penado por esti komprenata de kliento pro mia eta kono de la holanda lingvo. Subite mi rimarkis ke mia kliento portis Esperantan stelon, kaj tuj mi ekparolis esperanton (5), kiun mi estis lernanta dum nur unu monato. Tio donis reciprokan plezuron, kaj mi havis la kontentigon ricevi mendon po (5) 200 pundoj (2000 spesmiloj) antaŭ ol mi foriris de mia amiko. Antaŭ la milito, mi havis tre interesan korespondadon kun Rusujo en (5) Esperanto koncerne granitaj ŝtupoj. Eĉ la teknikajn terminojn mi sukcesis komuniki al miaj rusaj korespondantoj sufiĉe kontentige. Mi estas aĉetinta komercaĵojn el Germanujo, pere (5) de Esperanto, kaj amiko mia (5), bicikla vendisto, post reklamado en Esperanta gazeto, ricevis demandojn el multaj landoj, inklusive unu de araba komercisto en Persujo.'

Kio koncerne la "Modern Languages Committee" (Modernaj lingvoj kom.)? Tiu komitato estis nomita de S-ro Asquith, kiam li estis la Ĉefministro de Britujo, por esplori pri la pozicio de modernaj lingvoj en la eduka sistemo; kaj ĝia raporto eldoniĝis antaŭ kelkaj monatoj. La raporto iom favoris Esperanton, sed konkludis ke, se ia artefarita lingvo estas plenumonta la celon por kiu ĝi devas esti plej utila, ĝi bezonas pluan disvolvigon kaj multe pli grandan nombron da spertuloj. (Mi komprenas ke niaj Britaj samideanoj tute ne mal-kuraĝiĝas per tiu konkludo, sed nur estas instigitaj al pli fervora penado por disvolviĝi kaj spertuligi.)

Kio koncerne la "Common Commercial Language Committee" (Komuna komerca lingva kom.) Tiu komitato formiĝis en 1916? de eminentuloj de la Brit. Esp. Asoc. por la propagando de Esperanto en la komerco. Fama estas la eksperimento de unu el ĝiaj plej viglaj membroj, S-ro S. R. Marshall, kiu aranĝis trimonatan kurson partoprenotan de viroj kaj virinoj de Londono kaj aliloke. Rezulte—mi cite tradukas el la cirkulero eldonita por tiu komitato, "An appeal to patriotism and common sense" (Alpeto al la patriotismo kaj prudento); jen: "Internacia eksperimento, Okt. al Dec., 1916. Ni, la subskribitaj, geferistoj en la urbo Londono, partoprenintoj en la supranomita eksperimento, organizita de S-ro S. R. Marshall en sep malsamaj landoj (Rusujo, Francujo, Portugalujo, Norvegujo, Hispanujo, Argentino kaj Britujo), per tio ĉi atestas al la fakto ke, post nur tri monata instruiĝo de la organizinto, ni povis entrepreni internacian korespondadon (komerce kaj alie) kun studentoj simile instruitaj en la centroj difinitaj por la celoj de la eksperimento, kaj ke ankaŭ ni trovas ke la studo de Esperanto estas nepre efika al rapida kaj klara pensado kaj estas mirinda helpo al pli bona elkompreno de la nacia lingvo. Ni estas memfidaj ke tiu atesto povas esti ankaŭ donata pro tiuj el niaj kunstudintoj nun dejorantaj kun la standardoj." (Skribu al S-ro S. R. Marshall, Ludgate Circus, E. C., 4, ĉe S-roj Thos. Cook & Son, se vi deziras pluan informon.)*

Nun, ni devas rapidi. Trafa kaj memorinda estas la lekcio (angle) de S-ro A. Barton Kent, la 31an de majo, 1918, al la membroj de la Londona Komerca Ĉambro kaj aliaj, ĉe la oficejoj de la Ĉambro, pri la temo, "Komuna Komerca Lingvo." Estas bona represajo de raporto de tiu lekcio el la London Chamber of Commerce Journal, de July 1918" (ĉ. 500 vortoj), laŭforme flugfolio, kun la Esperanta traduko unuflanke, havebla de la supranomita S-ro Marshall. Ankaŭ, la tuta lekcio estas havebla por la prezo de 3d (Sm. 0. 12) kiel broŝuro Nro. 99 de la London Chamber of Commerce (Oxford Court, London, E. C. 4).

Rapidegu ni! Certe la komerca statistiko koncernas U. E. A., kaj en ĉiu kajero de ĝia organo "Esperanto" troviĝos, sub la rubriko "Oficiala Informo," "Statistiko de la Korespondadoj," kiun legu por vi mem. Plie, en sekcio 0 — Esperantujo ni enmetis kelkajn aludojn al la uzo de la lingvo. Nepre estas la malfacilaĵoj de milita laboro tre multaj, pri kiu estas grava artikolo de la redaktoro, S-ro Hodler, p. 86-7 de la Jul.-Aug. nro. Vidu, ankaŭ, paĝojn 30-2 de la Oficiala Jarlibro por 1916 rilate statistikon de la U. E. A. servado. Ĉe la komenco de la milito, kiel ni bone scias, la servoj estas tre multaj kaj gravaj por novaĵo pri la internigitaj, la vunditaj kaj la mortigitaj; sed post la starigo de regulaj, oficialaj informiloj, tiuj servoj fariĝis ne ofte necesaj.

En la grava angla broŝuro, *The Passing of Babel*, supremenciita (kiu, mi esperas, estos tradukita en multajn lingvojn, kaj eble jam estas Esperantigita), la jenaj ĉapitroj titoloj estas trafaj, ĉu ne? (Mi tradukis ilin). VI Esp. en Komerco kaj Industrio; VII Esp. en Vojaĝado kaj Socia Interrilato; VIII Esp. en Scienco; IX Esp. en Literatura; X Esp. en Dramo kaj Kanto; XI La Eduka Valoro de Esp.

Hodiaŭ ni legas multe pri la Ligo de Nacioj, kaj kompreneble ni baldaŭ havos multe da Esp. literaturo pri tiu temo. Laŭdinda estas

* Vidu la tri paragrafojn, p. 110 en *Esperanto*, Sept.-Okt., 1918.

la artikolo (angle) de S-ro Page en la Esperanto Monthly por Sep., 1918 (p. 93), kaj tre ŝatinda la proksima (Esperante), "Modelo de Interkonsento por Ligo de Nacioj," adaptita de tiu en la verko de S-ro H. N. Brailsford.

Bonekonataj estas la germanaj oficialaj raportoj, Esperantigitaj kaj forsenditaj (flavfolie) al Usono kaj kompreneble aliaj landoj; ankaŭ la informiloj iom poste eldonitaj de la francoj. Dum la lasta duono de la milito, mi kredas ke tiu praktiko, ambaŭflanke ĉesis; sed la afero pruvis la utilecon de la lingvo.

Fine, mi volus rememorigi la delongan kutimon por diversaj samideanoj reklami en la gazetaro certe, por tiuj kiuj deziras monhelpi la movadon, tiu maniero estas bona.

Aldona listo de firmaoj, k.t.p., uzantaj Esp., kompilita el "The Passing of Babel," 1913 (Long: La forigado de Babel), p. 68, kaj el "The Japan Salesman," Aug., 1918, p. 15, liveras: Austrian State Railways; Buchanan, Scott & Co. (Glasgow); Burroughs, Wellcome & Co. London, k.t.p.); Caucasian Pharmaceutical Trading Co. (Tiflis); Consett Iron Co. (Durham); Cunard Line; J. M. Dent & Sons (London); J. S. Fry & Sons (Bristol, k.t.p.); Hammond Typewriter Co. (New York, London, k.t.p.); Holden Bros. (London); International Sleeping Car Co. (New York, London, k.t.p.); Japy Frères (Beaucourt); Jenson & Nicholson, Ltd. (?); Kaitso Gomei Kaisha (Yokohama); G. B. Kent & Sons, Ltd. (London?); Frank H. Lockyer Supply co. (?); W. McCreight Brown(?); McVitie & Price (Edinburgh & London); Magasins du Louvre (Paris); Magasins de la Menagère (Paris); Magasins du Printemps (Paris); E. Marlborough & Co. (London); Moellander & Co. (Malmö); Muir, Bedall & Co., Ltd. (?); Oliver Typewriter Co. (London and Paris); Orient Imp. & Exp. Co. (Yokohama); Orléans Rly Co. (Paris); Philip, Son & Nephew, Ltd. (Liverpool); Rocher & Schneider, motor cars(?); Seiseisha Laboratory (Tokio); Henry Stephens, inks (London); Suchard & Co., ĉokoladoj (Neuchâtel); Swissbankverein (?); Swiss Japan. Trading Co. (Yokohama); Tenrindo Press (Tokio); Tobler & Co. (Bern); C. G. van der Heyden (Waalwijk); Guenther Wagner (Hanover and Vienna); Yost Typewriter Co. (London, k.t.p.); Zealand Steamship Co. (Flushing and London).

3 — Propagando

Kiel supre sugestita, mi atendas festvesperon la 29an de marto, je kiu dato (Bostone) ni proponas ke ni havu konkurson pri tiu ĉi temo: la propagando de Esperanto. Per tiu okazo ni bezonas seriozan pretiĝadon, kaj mi esperas ke, rezulte de tio, ni povas havi la plej bonan propagandan numeron de Amerika Esperantisto el ĉiuj ĝisdate. Multa estas la materialo de kiu ni povas elfari tian numeron. Ni havas en Usono kelkajn bonajn propagandistojn; kaj ŝatindaj estas la tiucelaj skribajoj kiujn nia samideano, S-ro. C. C. Coigne, sendis al mi antaŭ kelkaj semajnoj. Esperanto inter la knabskoltoj estas formo de propagando, kiun ni usonanoj lastatempe komencis. Mi mem, tre baldaŭ, intencas aldoni miajn penadojn al tiuj jam estantaj. S-ro Thompson eldon lastatempe tre bonan libreton por knabskoltoj.

Mi devas, tie ĉi, rekomendi la artikolon de S-ro Stettler (Ed. St.) pri la propaganda afero, sub la titolo "Esperanto antaŭ Ŝtata Komisiono," estanta "Kelkaj pripensoj okaze de la raporto de la Brita komitato pri Modernaj Lingvoj." La tuta devus esti represita en multaj Esp. gazetoj. Legu ĝin en "Esperanto," sep-okt., 1918, p. 109.

Grava formo de propaganda estas per la konstanta rubriko sur leterpaperoj kaj poŝtkartoj, k.t.p. Mi finos 3 — Propagadon por tiu ĉi okazo, per citado el la interesa letero de S-ro Docenl, jene:

"Clos Riveiere"
Saint Sebastien leg. Nantes
(Loire Inferieure)

La 30an de Novembro.

Tre Kara Samideano:

Al vi mi sendos la leteron kiun mi adresas al via granda Prezidanto Wilson.

Pensante ke ĝi povos interesi vin kaj niajn Amerikajn samideanojn, mi ĉiam estas via.

F. Doceul.

La 30an de Novembro, 1918.

Sinjoro Prezidanto:

Mi deziras, je la tempo kiam vi estas venonta Francujon, la landon kiun la nobla kaj dankema Ameriko jam venis por subteni en la batalo kaj por helpi venkante la barbarecon,—mi deziregas doni al vi la respektigon de tre modesta franca servulo kaj regnato.

Helpinte nin per ĉiuj la grandegaj fortoj de via demokratio, vi venas por doni al ni la subtenon de via persona apudesto, de viaj paroloj, de via sciado, kaj de via klara idealo, por efektiviĝi pacon justan kaj ĝustan, sen venĝado tamen sen malforteco.

Vi havas la grandegan kapablon aldoni al via spirito de idealismo, klaran komprenon de la realaĵoj; . . .

Vi jam bone meritas de la Humaneco, de l' Ameriko, kaj de la Francujo.

Antaŭ kelkaj monatoj mi permesis min sendi al vi memorskribon rilate al la uzado, de ĉiuj la interligitaj Nacioj, de unu internacia lingvo, unika, facile lernebla, skribebla, parolebla, kiu ebligus ĉiun anon de la estonta Ligo de Nacioj kiujn vi ĵus vidis sin defendi,—kiu ebligus tiujn sin kompreni sen malfacileco, sen tro granda laboro, en komunaj kaj komercaj interrilatoj.

Mi venas refari, ne malproksime de vi, la fervoran peton, kiun mi antaŭ ne longe al vi sendis, ankaŭ al ĉiuj el la Ĉefoj de la Ŝtatoj kiuj estas interligitaj aŭ asociataj en la Kruca Militiro. . . .

Apartenas al la eminenta ano de Ameriko kaj de la Humaneco kiu vi estas, al vi kiu ĉiam pensas pri mondo venonta, pli bona kaj pli frateca, komprenigi ĉiujn la registarojn interligitajn kunvenontajn en la Paco Kongreso, ke (por ke liaj sennombraj regnatoj, disaj sur la supraĵo de la tuta mondo, helpu pli efektive en la estonteco, komprenu pli bone unu la alian, kaj ke ĉiu pli vere amu ĉiun) estas bezone doni al ili la necesegan ilon de tiu ĉi humanema revolucio.

Ĉiu tago kiu pasas, kaj kiu vidas la formadon de novaj Ŝtatoj,—grandaj aŭ malgrandaj,—kiuj antaŭe kurbigitaj sub la jugo devis akcepti la lingvon de liaj venkintoj, kaj kies ĉefa zorgo en la regajnota memregeco estos renaskigi en la plena lumo de la Libereco la karegan lingvon de liaj prapatroj,—ĉiu tago, mi diras, pligrandigas la bezonon de unu lingvo komuna inter ĉiuj liberaj popoloj, hodiaŭ, morgaŭ, kaj ĉiam.

Mi donis, en mia memorskribo, la kialojn kaŭze de kiuj la anglaj, la italianaj, la polaj, aŭ aliaj naciaj lingvoj, vivaj aŭ malvivaj, ne devas elektiĝi.

Mi ne deziras rediri la argumenton kiu kaŭzis min flanken meti eĉ la gloran lingvon de Corneille kaj de Bossuet,—pro la malfacilaĵoj

de ĉiuj specoj, kaj pro la necesa tempo bezonata por lernigi ĝin al la homoj de ĉiuj la liberaj landoj, al la anoj civitanaj de la tuta mondo, al la homoj en ĉiu socia stato kiuj posedas ĉiujn gradojn de inteligenteco, kaj profundajn kaj mezebonajn.

Laŭ mia opinio, nur la lingvo "Esperanto"—kiun ĉiu persono volante povas lerni en la daŭro de nemultaj tagoj, aŭ almenaŭ de kelkaj semajnoj—ŝajnas al mi respondi al la tutaj bezonoj de la Nova Mondo, kiuj naskiĝos de la Paco kaj de la Frateco, retrovitaj sur la kampoj de buĉado.

Apartenas al vi juĝi, studi la demandon sen antaŭjuĝo, flanken metante tutan vian nacian fierecon antaŭ la komuna bonstato.

Se vi akceptos kaj akceptigos de ĉiuj—la Rusoj, la Siberianoj, la Ukrainianoj, la Ĥinoj, la Hindoj, la Angloj, la Italianoj, la Serboj, la Kroatoj, kaj aliaj—la lingvon de D-ro Zamenhof, tiam unu fojon ankoraŭ vi estos meritinta bone de la tuta Humaneco.

Kun la espero ke fine mi konvinkas la faman pensanton kiu vi estas, kaj ke mi jam faris vin la taŭgan efektiviganton de la ideo kiun mi subtenas, kaj kiun Zamenhof antaŭ kelke da jaroj sciis ĝenerale efektiviĝi—mi insiste petas, S-ro Prezidanto, ke vi bonvolante akceptu la certigon de mia patruja kaj fervora sindoneco, kaj de mia profunda amo por Humaneco, ĉiam pli bela kaj unuigita pli fratece.

(Subskribita) F. Doceul,

Antikva Adjuvanto de unua rango de la servoj civilaj de Hindu-Ĥinoj.

El la franca tradukis D-ro D. O. S. Lowell.

Siberio:

Nia entuziasma samideano, pastro In. Serišev, kreis kaj gvidas en la tuta lando, "Kultur-Instruan Movadon" de Altajaj Kooperativoj. Ĝi dissendis dum 6 monatoj 905 milojn da diverstemaj folioj al 1200 kooperaj societoj kaj sendas ĉiuloke lektorojn starigi kulturajn punktojn kaj lernejojn, kiuj laŭgrade enkondukos Esp. En multaj gazetoj oni aperigas senĉese artikolojn pri Esp. La K.-l. Movado mendis pere de Esp. en Anglujo kaj Ameriko 300 kinematografojn kaj 500 filmojn kaj celas purigi kaj nobligi la kinematografon konsiderante ĝin morala kaj eduka forto. — **Barnaul:** La tieaj Esperantistoj organiziĝis en Esp. Societo, al kiu aliĝis preskaŭ la tuta junularo de la tiea kooperativo. Ĝi faras enketon inter la loĝantaro pri Esp. S-ino Kungurova kaj S-ro Tokarev gvidas kursojn kun 125 lernantoj. En la mezgrada lernejo estis Esp. grupo de 60 knaboj, kiuj pro manko de instruistoj mem lernis Esp. La movado pli kaj pli revigliĝas. — **Berezowka:** Multaj militkaptitoj en tiu ĉi tendaro lernis nian lingvon; ekzistas sufiĉe granda biblioteko kaj gazoneto titolita "La semanto."

4 — Konduko

Kio pri tio? Mi volus diri multon; tie ĉi mi kontentiĝos per kelkaj citaĵoj el artikolo kompilita de mi mem, kiun, bonvole, nia samideana gazeto The British Esperantist presis en ĝia kajero por Feb., 1918. Mi esperas ke nia Amerika Esperantisto havos serion de artikoletoj, kiujn mi ĝoje prilaborus, entenante sugestiojn por la vigla pasigado de klubvesperoj. Ofte ni havas viglajn vesperojn, kaj ofte malviglajn. Mi deziras ke ĉiuj niaj vesperoj estu viglaj; ĉar, pro manko de amuzoj kaj instigoj, de tempo al tempo unu aŭ alia el niaj membroj ekĉesas (5) alveni. Kompreneble la saman spertadon havas multaj societoj tra la mondo, kaj iliaj prezidantoj ĝojus elsci la rimeadojn, per kiuj ili ne nur tenus ĉiujn la estantajn membrojn sed ankaŭ

revenigus la estintajn. Jen kvar citaĵoj kiujn eble kelkaj grupestroj trovos helpaj por kvar grupkunvenoj:

La estro diras al la lernantoj: "Mi intencas foriri kaj devas paki la valizon; mi nun enmetas vestojn," sed mi deziras, ke ĉiu en la ĉambro helpu min"; tiam ĉiu lernanto devas ripeti la tutan frazon kaj **ankaŭ aldoni alian objekton**; post eble dek minutoj ili devas ripeti (kiel ekzemple): "Mi devas paki la valizon; mi enmetas vestojn, gantojn, ŝuojn, pantoflojn, kombilon, broson, sapon, dentpurigajon, kravatojn, ombrelon, ŝtrumpetojn, naztukojn, k.t.p."; oni trovos, ke la lernantoj bone memoros la nomojn de la diversaj objektoj. Ne estas grave, ke ili nomas ridindajn objektojn, se ili povos memori kaj ripeti ilin." (Birmingham.)

"En niaj kunvenoj ni ordinare elektas Esperantan libron, el kiu ni legadas paragrafojn laŭvice kaj poste tradukas anglen. Ofte tia legado okazigas interesajn diskutojn pri gramatikaj punktoj, kaj pri la temoj traktitaj en la libro, kaj tio instigas al Esperanta parolado." (Bath.)

"Ni . . . tre amas ludi ludojn kiel, 'Pensu pri nutraĵo, parolu la unuan literon kaj diru, kiom da literoj ĝi enhavas,' kaj la aliaj povas demandi, 'Ĉu la vorto estas viando, fiŝo, legomo, mineralo?' kaj cetere; aŭ oni povis pensi pri io en magazeno de spicisto aŭ legomisto. Alia tre bona ludo estas: skribu sur papero la nomon de famekonata persono kaj pinglu la paperon sur la dorson de membro; tiu membro divenos la nomon per demandoj, 'Ĉu mi mortas? Ĉu mi estas viro?' Ĉu mi estas soldato, aktoro, reĝino? Ĉu mi jam de longe mortas?' kaj la respondoj ĉiam estos, 'ne' aŭ 'jes.'" (Bexhill, Sussex.)

"Dum la somero la grupo aranĝas unu aŭ du ekskursojn en la ĉirkaŭaĵoj kaj anoncas ilin publike, ke la samideanoj povu veni el ĉiu Londona regiono. En vintro okaze ni aranĝas socian vesperon, al kiu la anoj invitas geamikojn, kiuj eble interesigos je nia afero. Ni ankaŭ interŝanĝas vizitojn kun aliaj najbaraj grupoj, aŭ iras esplori muzeon aŭ alian interesan lokon." (Buckhurst Hill, Essex.)

Legu, se vi posedas ĝin, la tutan artikolon, kaj iaokaze bonvolu sendi al mi viajn proprajn sugestiojn rilate grupkondukadon, per kiuj mi havos konsilon eldoni al mondesperantistaro.

Vidu ankaŭ la "Esperanto Monthly" por Okt. (kaj Nov.), 1917.

5 — GRAMATIKO

Tiu fako de Esperantismo, ofte transaludita per interkrampita nombro (5), kaj eble tre interesa al kelkaj, kvankam tre malinteresa al multaj, mi mallonge kaj nur sugestie kaj demande (por mia informo) pritraktos, jen:

18 **aprilo** (ne ordinare **aprilon?**); **-ata** aŭ **-ita** kun estas kaj estis? Amiko mia (angle, A friend of mine?); Bibliograf (i) o?; Brita iam por Brituja?; Daŭr (-ig?) as aperi; De? da? el? (mi havas dubojn kelkloke); Des pli (ofte sen ju pli?); Praktiko iam por ekzerco?; En? dum? per? sur? (mi havas dubojn kelkaloke); E (e) sperant-o, e, en, on? (mi ofte dubas); -iĝas per aŭ -ata per? (La jarlibro devus havi la oficialajn decidojn dum tuta jaro); Jarlibro iam por jarlibron kiam ĝi estas titola nomo?; Jam -is ĝenerale prefera al estis -inta?; Kajero? aŭ nombro? aŭ nro.? aŭ Nro.? aŭ eldono? aŭ ekzemplero?; (ankaŭ la diferenco inter numero, nombro kaj cifero?); Kio kaj kiu ambaŭ pravaĵ iuloke?; Kio ĝenerale sufiĉa por tio kio?; Komence ĝenerale prefera al komencante?; Krom signifas aŭ escepte aŭ aldone al?; Kover (il) (t)o?; Naskigos?; Paris aŭ Parizo? (Geneve aŭ Genevo? Svis-uj?-land-o?); Pere de (mi tre ŝatas); Po 200 pundoj (valore) aŭ por . . .? Sekva estas aŭ sekve estas? Supre aŭ supra kiam ĉiu estas uzebla? Teo (s) (z) ofio? Volu ke (angle, Would that); Ĉu oni tute komprenas mian signifon de Volus kaj Devus?

Kelkajn vortojn kaj frazojn kun la aluda "(5)," mi ne havas spacon pridiri, sed ĝenerale la demando estas memevidenta. Mi ne forgesas la Zamenhofan "Lingvaj Respondoj," kaj mi ĝojas noti la "Lingvaj Studoj" en gaz. Esperanto. Ankaŭ la Saussura "Vort-Strukturo" (2a eld. "havebla senpage ĉe la Svisa Esperanta Societo, 10, Hotelgasse, Bern) estas por mi tre, tre helpa.

6 — Personoj

Mi esperas ke por la celoj, kiujn mi volas atentigi, la sekva listo de viglaj, estinte viglaj, nepricertaj kaj aliaj, familiaj nomoj, pruvos profitdona enmeto: Abdul Baha, Amster, Baker (du), Bibbey, Blaise (du), Blish, Boyce, Brown, Butler (du), Cense, Chavet, Christen, Coigne, Coolidge, Delaby, Doceul, Eliot, Fessenden, Freeman, Fuller, Gove, Guilbert, Hailman, Hall, Hankel, Hills, Harrison, Hastings, Huse, James, Kabe, Katryn, Kavanaugh (du), Kent, Lang, Lawrence, Long, Loud, Mann (tri), May, Mees, Morton, Muller, Mybs, Ogden, Page, Parrish, Payson, Pearson, Perigordo, Phillips, Pollen, Reed (du), Rifling, Salandri, Schinz, Scott, Sharp, Spillman, Stevens, Stoeppler, Stone, Swan, Tenney, Travis, Twombly, Vemeno, Vogel, Walker, Warden, Weems, Whittle, Woolway, Wynter. Al ĉiu el tiuj, mi ĝoje penos doni la precizan kialon por la enmeto de la familinomo, se li demandas; sed nepre mi deziras ke ĉiu ricevu ekzempleron de la raporto, krajone strekitan kontraŭ lia nomo. Al kelkaj mi intencas sendi leteron aŭ poŝtkarton. Mi volus ke ĉiuj estu baldaŭ tiom viglaj kiom la plej nun entuziasma, kiu ja estas enviindulo.

7 — Bibliografio

Estas kelkaj, ne tre multaj gravaj Esp. libroj, eldonitaj dum la milito, kiujn nia multdezirinda jarlibro devus anonci; sed tie mi nur havas spacon por listo de hodiaŭaj gazetoj* pri kiu, se ne kompleta, bonvolu informi Amerika Esperantisto:

Esperantistaj Gazetoj

- Amerika Esperantisto**, "American Esperantist Co.," West Newton, Mass., U. S. A.
Argentina Esperantisto, E. Unidos 1354, Buenos-Aires, Argentino.
Brazila Esperantisto, Praça Quinze de Novembro, Rio de Janeiro, Brazilo.
British Esperantist, "British Esperanto Association," 17, Hart Street, London W. C.
Bulteno de la Svisa Esp. Societo, Gullmanstr. 57, Zürich.
France-Esperanto, Office central Espérantiste, 51, rue de Cligny, Paris, France.
Esperantista Voĉo, Salo Grenkamp, Dietlâ 62, Krakau.
Esperanto, "Universala Esperanto-Asocio," 10, rue de Bourse, Genève.
Esperanto Monthly, 218, Brunnsfield Place, Edinburgh, Skotlando.
Germana Esperantisto, Ader & Borel, 40 Struvestrasse, Dresden A I, Germanujo.
Holanda Pioniro, J. L. Brnijn, 37 Paul Krugerlaan, 's-Gravenhage, Holando.
Japana Esperantisto, Japana Esperantista Asocio, 155 Kogaj-ĉo Azabu-ku, Tokio.
La Eklezia Revuo, Farnley Tyas Vicarage, Huddersfield, Anglujo.
La Espero, J. Lundgren, Hedemora, J. Helsing, Gaevle, Svedujo.
La Teknika Revujo, 10, Hotelgasse, Bern.
Latinamerika Esperantisto, Apartado 1824, Habana, Kubo.
Le Monde Espérantiste, 3, rue Sophie-Germain, Paris, Francujo.
Nederlanda Katolika, Postbus 5 — 's-Hertogenbosch, Holando.
Ondo de Esperanto, 3 Lubjanskij projezd, Moskvo, Ruslando.

Esperanto Finlando, Finlando.
 Esperanto, Bahia Blanca, Argentino.
 La Progreso, Bohemujo.
 Esperanto Raporto, Danujo.
 Petrograda Revuo, Petrograd, Rusujo.
 Estonto, Harlem, Holando.
 Voĉo de la Popolo, Shanghai, Ĥinujo.

8 — Miksaĵo

La sekvantaj temoj meritas sed ne povas ricevi spacon: 1. Mia propono ke ni havu diversajn unutemajn eldonojn de Am. Esp.; precipe unu pri lernejoj kaj unu pri propagando; 2. la koresponde kondukita kurso por aerveturistoj de S-no Cense; 3. la lernado de Francalingvo pere de Esp.; 4. Esp. en la lernejoj de Rio kaj Sergipe, Brazilujo; 5. Esp. en la Ĥina Nacia Universitato; 6. la lernigado pere de fonografo; 7. Esp. stenografo; 8. ludoj kaj teatraĵoj; 9. la lecionoj en "Lefax"; 10. la premioj de la gazeto "Future" por Esperantaj tradukoj; 11. la "World Salesman" (Mond-Vendisto), kaj ĝia intima rilateco kun Esperanto ĉie; 12. la vidpunkto kaj rimarkoj de la tag-jurnaloj pri Esp.; 13. libroj ricevitaj; 14. rimvortaroj; 15. poeziaĵoj; 16. eklezia bibliografio; 17. nova kaj mal-nova Testamentoj—Koncerne tiun ĉi ni daŭrege estas atentintaj la tutan Bibliion; kiam ni ricevos la tradukon de nia amata majstro?

9 — Bezonoj.

Oni devas inciti aliĝadon al U. E. A.

Oni bezonas alfari la ĉefsidejon je Genevo por la postmilitaj kondiĉoj.

De Genevo devas elveni grava jarlibro enhavanta: a. respondon al la demando, "Kiel progresas Esperanto?"; b. modelajn lecionojn por komencantoj; c. modelan propagandajon tradukindan en ĉiujn lingvojn.

Ni bezonas landkarton—parto aŭ ne de la jarlibro—ĉiujare eldonatan, kiu elmontras la fortikejojn de la Esp., kaj per variaj mallongaj, signoj, k.t.p., elmontras la gradon kaj specon de la agado.

Oni nun komencu ke estu faritaj desegnoj por Esperanta Kristnaska bildkarto utila por propagando, kiun povus vendi Genevo kaj agentoj aliloke.

Ni devas modeli niajn societojn, naciajn kaj lokajn, laŭ konstitucio devenita de Genevo, la subreguloj nuraj estantaj loke alfaritaj kaj alprenitaj.

La venonta kongreso, universala aŭ nacia, devus esti iome koresponda kongreso, por ke tiuj kiuj ne povos veni povos skribi leterojn kiujn komitato povos konsideri kaj laŭvole prezenti al la kongreso.

Oni devas normigi sistemon stenografan por uzado de ĉiuj Esperantistoj anstataŭ la nuna konkursado.

Ni bezonas enciklopedion de folioj elmoveblaj kies precipa enhavo interesos ĉiujn ĉie.

Marto 29, la unua de la kvinaj sabatoj de tiu ĉi jaro, oni rekomendu por propagandtago Esperanta tra la tuta mondo. Se ĝi bone sukcesos, enkonduku ni la principon de "kvinsabatoj," festante Esperanto-tagojn ankaŭ Majo 31, Aŭg. 30, kaj Nov. 29.

Ni bezonegas havi pretan respondon al la posta demando de la ne-Esperantist-aro:—"Kiel progresas via lingvo?"

Sendu el kiu ajn parto de la mondo vian respondon (ne pli ol cent aŭ malpli ol kvindek vortoj) al "Bostona Esperanto Societo" (402 Pierce Bldg., Copley Square, Boston, Mass., U. S. A.), ĝustatempe por nia konkursa konveno de Marto 29, kaj eble vi gajnos la premion kiun mi donos por la plej bona respondo, faktojn vi trovos en tiu ĉi raporto sed trovi ilin ankaŭ en la plej lastatempaj gazetoj.

—Kial vi volas vendi vian noktoveston?

—Nu pro kio ĝi utilos al mi nun, kiam mi nun estas noktgardisto, kaj dormas dum la tago!

—Esperanto Monthly.

We would remind those who made the pledge at Green Acre to be saving their shirts for their expenses en route to the 12th International Convention.

The Surprises at Sylvia Farm

A Propaganda Play in Five Acts

By HENRY W. FISHER
Ex-President of the E. A. N. A.

THIS IS A VERY CLEVER LITTLE PLAY, AND A WELCOME ADDITION TO OUR LIST OF PUBLICATIONS.

MR. FISHER has paid the whole expense of publication and offers the entire receipts from its sale for the use of the Central Office in propaganda work. Will you meet him half way, and enable us to dispose of the entire edition of 1000 copies at once?

25 cents per copy, postpaid

The Esperanto Office, West Newton, Mass.

"THE WORLD SALESMAN"

(Grown out of the Japan Salesman)

A Monthly Commercial Review. published in Yokohama, Japan, by an American concern

THE WORLD SALESMAN is the first commercial journal to have drawn attention to the value of Esperanto as the common commercial language. It has regular articles on Esperanto, and publishes the names of firms using the international language.

It will keep you posted on World Trade. If you want to do business with the Far East or any other section, IT WILL PAY YOU TO ADVERTISE IN THE WORLD SALESMAN.

Advertising Rates on application. Subscription, \$5.00 for two years.

HEAD OFFICE: 51, YAMASHITACHO, YOKOHAMA, JAPAN.
NEW YORK OFFICE: SINGER BUILDING.